2.ª JARO N.º 5 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 JANUARO 1937


# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## GEOGRAFIA BILANCO

La piaj gvidantoj de hispana ribelo bezonis ne nur pravigi sian kriman aventuron, kiel plenumon de sankta komisio, sed ankaŭ ili avidis, antaŭ la grimacoj de siaj fremdaj dungantoj, montri kapablojn por movi la armeon k uzi la ŝtatajn armilojn kontraŭ la leĝo, la ordo k la vivo de sia propra nacio. Plano, zorge polurita, pri vendo de pecoj el sia patrio, ŝajnis al ili afero facila, kvazaŭ strategia ludo aŭ ekzerca promenado. La rapida subita popola respondo, ĉe la eksplodo de l' komploto, detruis tiajn ĥimerojn. Nur la loĝantaro de kelkaj urboj k vilaĝoj, en mizeraj provincoj, falis viktime sub hufoj de la tiranio. La ĉefaj urboj, la plej riĉaj regionoj, aroge piedpremis la araneon k transformiĝis vigle je apogaj punktoj, kun morala simbolo, en industriaj bazoj k ekonomiaj centroj, por la unua serioza batalo en la mondo, pri kiu la faŝismo devis atente kalkuladi. La fanfarona intenco pri absoluta k tuja subpremo estis ja fiasko! La ĉiulanda reakcio dubis jam pri la kapablo de siaj hispanaj servistoj kun generala kostumo. La tero tremis konvulsie. Estis necese fabriki-urĝe fidon pri la nepra venko de l' faŝismo.




Ekfunkciis perfekta propaganda aparato per brua skandalo, per cinika mensogado, pri jam preskaŭ submetiĝo de la tuta lando. Tamen... blufo ne estas pruvo de konvinko, per blekoj oni evitas nur parolojn. Antaŭ groteska parado de mensogoj, pri la amplekso de faŝista teritorio, decas, ke sur la gracia karto geografia de Hispanio, honesta mano el popolo, dum velkas la jaro, montru al internacia observanto la respektivajn poziciojn k la direkton de la zigzaga linio de la frontoj. Sen timo al la vero, oni invitas ĉiujn observi, kun serena rigardo, la situon de la provincoj kie la faŝismo regas, parto maldense loĝata, kun malriĉa agrikulturo, preskaŭ sen industrio, sen komerco, sen ĝojo en la vivo sklaveca, kiu brule konstrastas kun la riĉa lojala teritorio, kie la popolo, mastro de sia medio, estas preta oferi ĉion por elviŝi la ombron, kiu ankoraŭ nun estas funebra stampo sur duono de la lando.

## Nova Jaro...

Laŭ antikva kalkulo, por la mezuro de tempo, freŝa jaro ĵus naskiĝis. Nova kolekto da tagoj sfinkse ĵaluzas pri la mistero de sia influo sur la sorto de la homoj.

Neniam, en komenco de jaro, oni sentis tiel intense la bezonon rapidigi la akcelon de daŭra k sorĉa turnado de minutoj k horoj... ĉar ankaŭ neniam, ĝis nun, la valoro de kelkaj semajnoj, aŭ de kelkaj monatoj, estis tiom grava k tiom decida por la destino de nia lando k, eĉ tute certe, por la progreso de la Homaro.

Espero brulas, sopiro flugas alten, en celo tre nobla, kvazaŭ sago kuraĝa sible penetranta en la enigmon blankan de la nova periodo socia.

Gajni la militon dum la nova jaro! Jen aspiro kulmina de nia popolo. Kanto de patrino per voĉo malseka, pro larmo sincera. Balbuto de infano naiva. Penso de knabino, kun tremo de amo en la koro. Krio dum batalo de juna proleta soldato. Hardita konvinko de ĉiuj falintoj, en impeto sankta, kontraŭ la faŝismo. Susuro vibranta en aero. Poemo natura, en lanugo de nuboj, verkita per fumo majesta k pompa tra la kamentuboj de niaj fabrikoj. Murmuro alloga, kiu lulas karese, laŭ fluo de vosto el ŝaŭmo, sekvanta fidele la ŝipojn de la libereco, trairantaj la ondojn de maro perfide semita per minoj italaj aŭ per germanaj submarenoj.

Venki la faŝismon dum la nova jaro! Jen solena promeso al la tuta mondo. Devizo konscia entuziasme signita, per rubenoj el sango, kun fortaj trajtoj, sur la impona pordo de la nova jaro.

Nova jaro, nova espero, nova ĝuo, nova forto por batali ĝis la venko en nia kruela milito, necesa kondiĉo k sola rimedo por nova civilizo k nova kulturo...

Esperanto, nia lingvo de arto k paco, en sia matura jubileo, en la nova sia festojaro, teksos tra la mondo, per belaj kombinoj de frazoj k vortoj, kun silkaj fadenoj k verdaj folioj, unuecan senton inter ĉiuj homoj kun milda emocio, por ne mem ekspluati, k eĉ kun sufiĉa talento aŭ sana muskolo por eviti perforton en justa kolero.

Nova jaro, nova vivo! diras hispana proverbo, kiel gaja deziro pri vivo vivinda, pri vivo serena k ĝoja. Mirinda realo, post morto de l' drako faŝista, en la nova jaro, kiu portas ĝentile, kun laŭroj, simbolan donacon de ora ŝlosilo por la nova Epoko.

KOMENTARIOJ

# CINIKA CELO

Senĉese elŝprucas el kaŝata fundo de pluraj k diversaj nekonfeseblaj motivoj, novaj k signifaj detaloj montrantaj interesajn nuancojn de l' ekonomiaj celoj, kiujn persekutas germana k itala faŝismoj.

Germana respondo al anglofranca propono pri projekto celanta restarigon de paco, emfaze proklamas ke germanaj faŝistoj arde deziras pacon k ordon en hispana lando. Serioze ĝi asertas ke Hitlera registaro bone plenumis sian devon rilate al «ne interveno» k furioze atakas la senhontajn registarojn, kiuj sendis volontulojn al hispanaj armeoj. Trankvile ĝi pledas por efika kontrolo k formale konstatas ke la solaj personoj kiuj kapablas reprezenti hispanan popolon estas la generaloj perfidaj, kiuj per fremdaj trupoj deziras perforte subpremi la landon. Finfine ĝi atakas hispanan registaron k intencas konvinki ke pravo k justo nur estas en servo de l' nigraj generaloj.

Itala respondo, kun similaj frazoj ankaŭ esprimas pacajn dezirojn, parolas pri defendo de «okcidenta civilizo», atakas diversforme hispanan registaron k fine esprimas ke ĝi simpatias kun ĉiuj proponoj celantaj al paco k fina ĉesigo de hispana lukto.

Neniam oni vidas en monda historio tiom grandan pruvon de cinika sinteno kiel la montrata per tiaj dokumentoj. Faktoj valoras sed ne falsaj vortoj k faktoj nur montras ke fremdaj faŝistoj helpas senĉese hispanajn ribelintojn, ruze celantaj krei fortan bazon en okcidenta Eŭropo por akiri krudaĵojn k apogi sian marŝon al definitiva triumfo de faŝismo en tuta Eŭropo.

Novaj detaloj aperas ĉiutage kiuj plene konfirmas la faŝistajn planojn tiucele direktitajn. Italio preparas, kiel ni priskribis en antaŭa numero, hidrargan monopolon; itala gazeto tutĝoje anoncas ke jam estas finita grava interkonsento inter Romo k Berlino pri ambaŭflanka ekspluatado de certaj kolonioj, kiuj ne estas nomataj. Mussolini 'a delegito en insulo Mallorca, Grafo Rossi, kiu diktatore gvidas militajn preparojn de l' armeo faŝista, ĵus raportis al angla ĵurnalo ke li nur celas konkeri Katalunion; eble li celas al potasaj minoj k diversaj industrioj kiuj estas plej gravaj el tuta Hispanio.

Sed estas pli vigla la germana agado ĉar ne nur ĝi temas pri sistema ekspluatado de hispana lando; ankaŭ ĝi sin turnas al nia «kara» najbaro, Portugalio, kies diktatoro Oliveira Salazar estas preta cedi kolonion Angola al germana societo, solvo adoptita ĉar li ne kuraĝas fari publike formalan donacon aŭ vendon. Li ja timas ke portugala popolo estas preta leviĝi k forte renversi faŝistan reĝimon.

Germanaj aferoj en hispana lando senhalte prosperas rilate al feraj krudaĵoj. En Berlino staras komerca organizo nomata «Rowak» kiu monopolas distribuon de fera mineralo; en Seviljo estas starigita alia simila organizo nomata «Hisma» kiu ankaŭ monopolas distribuon de fera mineralo de minoj kiuj estas en faŝista zono, k kiu sendas ĝin al sia patrino au fratino Berlina. Miloj da tunoj estas senditaj al ĉefaj havenoj de ruza Germanio, kiu per tiu sistemo facile akiras tiun necesan krudaĵon, kiun certe ĝi ne pagas. Germanio kompensas per karaj armiloj la feran krudaĵon, kies malkaran prezon certe ĝi mem taksas.

Faŝistaj aŭtoritatuloj de Burgos publikigis oficialan ordonon al Kompanio de Minoj de l' Riffo por ke ĝi sendadu sian produktaĵon al germanaj aĉetantoj. Estas kolonelo Sanchez Gonzalez kiu subskribis tian ordonon, k ĝi sekvigis la starigon de l' interkonsento supre citita, kiu bone permesas al Germanio konvenan aĉetadon de tiu varo, nepre necesa al milita industrio.

Krom tio, faŝistaj generaloj estis devigataj ankaŭ organizi eksportadon al Germanio de ĉiuj eblaj agrikulturaj produktoj; sed tial ke en la zono regata de l' faŝistoj neniu kamparano semas nek plugas, ili nur povis aranĝi eksporton de certa kvanto da oliva oleo.

Germanoj profitas eĉ lastan guton da utiligebla suko, kiun hazarde posedas perfidaj generaloj, sed tio ne povas fariĝi longedaŭra, ĉar en ribela kampo neniu laboras k baldaŭ ili forlasos tiun provizoran entreprenon ĉar ĝi ne plu estos fruktodona.

Iom post iom sendube aperos novaj detaloj pri ekonomiaj planoj de faŝistaj registaroj, kiuj avidas trovi en nia lando necesan savilon por sia katastrofa faŝista ekonomio.

Ni detruos plene tiajn celojn!

## TRAFA RESPONDO

Hispana registaro respondis al Londona Komitato pri «ne interveno», rilate al proponita kontrolo en nia lando, jene:

«1.—En Hispanio ne batalas du samrajtaj grupoj. Ĉe unu flanko staras legitima registaro kies origino estas la balotado de 16ª de lasta Februaro, sufiĉe proksima ankoraŭ por ke neniu povu dubi pri vera opinio de la enlandanaro. Ĉe kontraŭa flanko staras grupo da perfiduloj sen ia leĝa origino, kiu ribeliĝis precize ĉar ili ne volis akcepti la rezulton de tiu balotado; malantaŭ ili konfuziĝas miloj da maŭroj portitaj el Maroko k faŝistoj el Germanio k Italio. Aljuĝi al aŭtoritatuloj de Burgos, kiuj kulpas pri monstra detruo de Madrido k estas kovrataj per koto de krimoj, internacian personecon estus plia signo de malhonoro al internacia vivo.

2.—Hispana registaro denuncadas de antaŭ pli ol tri monatoj, al potencoj subskribintaj la interkonsenton pri «ne interveno», la senmaskan neplenumon de tiuj decidoj, fare de Germanio, Italio k Portugalio. Dum tiu tempo la ribelintoj ricevis el citítaj nacioj aeroplanojn k gasojn por mortigi virinojn k infanojn, anstataŭ permesi tian taktikon de «faktoj plenumitaj» oni povus kontroli la faktojn denuncitajn k adopti decidojn por eviti daŭrigon de l' sinteno de tiuj nacioj kiuj kulpas pri plilongigo de nuna milito k pri la sango intertempe verŝita.

3.—Hispana registaro ĉiam opiniis k daŭre opinias ke legitima registaro rajtas senkaŝe k ĉiel akiri la necesajn armilojn por venki ribelon en sia propra lando.

4.—Internaciaj normoj ne permesas liveri armilojn al kontraŭuloj de legitima registaro, k tia liverado kreas novan specon de atako; tiun, kiu konsistas el helpo al internacia ribelo, kiel denuncis nia reprezentanto en lasta kunveno de Ligo de Nacioj. Helpo al legitima registaro por ke ĝi povu plene konservi internan ordon, estis deviga normo de internacia leĝo ĝis nun.

Tiaj faktoj estas sufiĉaj por ke hispana registaro rifuzus akcepton de via plano pri kontrolo. Tamen, ne cedante eĉ milimetron de sia pozicio supre klarigata, ne ekzamenante ĝisfunde planon, kiu enhavas mankojn tiel gravajn kiel nenia mencio pri kontrolo de portugalaj havenoj (tra kiuj ricevis ĝis nun ĉion la ribelintoj), Hispana registaro ĉiam fidela al siaj pacaj idealoj k preta helpi la Londonan Komitaton en ĝia tasko kontroli kiuj estas la perfiduloj de la interkonsento pri «ne interveno», akceptas principe vian projekton, konservante la rajton tamen diskuti ĝin plendetale.

## Ofero de vivo en defendo de rajto ne estas ludo nek moda spektaklo

# LETERO EL LA FRONTO

Guadarrama, la 19an decembro 1936

Kara amiko k samideano:

Ĵus mi ricevis vian lastan, per kiu mi bone sciiĝas pri via bonfarto; ankaŭ mi bonfartas k mia fido al fina venko kreskas de tago al tago.

En ĉi tiu sektoro ni firme staras k la faŝistoj malsukcesas ĉiam, kiam ili intencas preni niajn tranĉeojn; hieraŭ ni ricevis amuzigan atakon, kiun mi priskribos al vi:

Je la meznokto de malvarmega, malhela k pluvoplena nokto, dum forta blovado de vento, aŭdiĝis grandega bruo; kelkaj grenadoj eksplodis malantaŭ niaj tranĉeoj. Tuj, ĉiuj eksaltis k okupis siajn postenojn atendante la tiel anoncitan atakon, sed vane, ĉar ili ne kanonpafis por ataki kiel kutime; ili nur celis averti nin pri parolado kiun ili tuj faris al ni per laŭtigilo.

Niaj tranĉeoj estas malproksimaj je tridek metroj el la iliaj k tial ni tre bone aŭdas nin reciproke; iu faŝisto kiu sin nomis kiel oficiro invitis nin «ĝentile» forlasi niajn vicojn, li diris ke ni estas trompitaj ĉar estas la faŝistoj kiuj defendas laboristan idealon.

Ni respondis kiel decas k certigis al li ke ni baldaŭ venkos; tiuj vortoj furiozigis ilin tiagrade ke tuj fluadis minacoj k insultoj sekvataj de ĥora kantado de reĝa himno. Samtempe k plenaj je entuziasmo ni kantis respublikan himnon k la Internacion.

La faŝistoj indigniĝis, difinis al ni limtempon 15-minutan por nia kapitulaco per vortoj konsistantaj el miksaĵo de minacoj k petoj, kun promeso premii nian obeon. Ni kantis, kantadis k zorge atentis pri la malamikoj, kiuj koleriĝis pro niaj popolaj kantoj tiom malŝatataj de ili. Raŭka pro kolero tiu «oficiro» bleke ordonis: «Antaŭen, kuraĝa legio...» k ili eliris el siaj tranĉeoj elkriante insultajn vortojn per kiuj ili kredis timigi nin. Ni respondis per mokaj frazoj, nia artilerio pafis ilian ariergardon, niaj fusiloj k mitraliloj ekfunkciis rapide, niaj ministoj ĵetis dinamitajn kartoĉojn k manbombojn k ili disiĝis forkurante timigitaj dum ni ĉasis ilin kiel kuniklojn...

Poste ili anoncas emfaze: «En sektoro Guadarrama hieraŭ ni atakis kuraĝe...»

Salutu niajn amikojn k ricevu fortan k revolucian brakpremon de via k-do,

J. A.

# POR EFIKA HELPO!

Inter la multenombraj leteroj, kiuj ĉiutage alvenas en nia Redaktejo el eksterlando, troviĝas ofte kelkaj, verkitaj de sindikatoj k de aliaj labor-organizoj. Ili enhavas varmajn salutojn k deziresprimojn pri nia venko. Preskaŭ ĉiuj laboristoj en la mondo, mallaŭdas la sintenon de sia registaro pro malpermeso liveri municion, kanonojn, maŝinpafilojn k aeroplanojn al la legitima hispana Registaro. Eĉ multaj skribintoj promesas al la hispana laboristaro fari ĉion eblan siaflanke por ŝanĝigi la aferon, favore al nia batalo kontraŭ la faŝismo.

Sincere ni devas diri al esperantistaj kamaradoj, kiuj peras tiun korespondadon tiel afable k bonintence, ke bedaŭrinde nek ni povas akurate esti perantoj por la interskribaĵoj nek la koncernaj sindikatoj k organizoj ĉi-tieaj povas nun respondi ĉiujn similajn korespondaĵojn, des malpli ke tiuj esprimoj k rezolucioj ja meritas dankon ĉar pruvas, ke nin akompanas la simpatio k la subteno de la alilandaj laboristoj, sed neniel taŭgas kiel praktika helpo.

Sen ofendo al niaj samlingvaj kamaradoj, kies klopodojn ni cetere agnoskas, ni diras ke se ili volas efektive helpi nin en nia luktego kontraŭ la internacia faŝismo, terura lukto postulanta elverŝadon de proleta sango hispana, ili simple agu jene: ili penu agitadi sialandan laboristaron k estu niaj perantoj por komprenigi al siaj kamaradoj, ke LA SOLA VOJO EFIKA por akceli k sekurigi la triumfon de la hispana proletaro, estas INSISTE POSTULI, KE ONI LIVERU AL NIA REGISTARO ĈIAJN BATALILOJN LAŬRAJTE.


Ni ne donas konsilojn al ĉiu ajn. Sed kiam ni vidas, ke absolute nenio praktika tiucele estas ĝis nun farita, malgraŭ la fortika organizado de eŭropaj laboristoj, precipe en Anglio k Francio, ni ne povas silenti, ke per fratecaj leteroj ni ne povas anstataŭi la necesajn armilojn k ke ni riskas esti venkataj spite al tiu amaso da salutesprimoj k bondeziroj, tute platonaj.

Ni preferus, ekzemple, dudek-kvarhoran ĝeneralan strikon de la potencaj Labor-organizoj, kvazaŭ avizo pri solidara sento al hispanaj laboristoj kiuj oferas sian vivon por ĉies libero.

Ekde nun, do, ni esperas, ke oni urĝe entreprenu vastan kampanjon por devigi la koncernajn registarojn, ne plu elteni la absurdan akordon pri ne-interveno, konsakranta la senmoralan principon de egalrajto de rab-murdisto kun la viktimo, kio estas fakte favori la ribelintojn k bojkoti la hispanan popolon k ĝian aŭtentikan Registaron. Senpacience ni atendas sciigojn pri plenumado de tiu vere solidareca tasko!

Ni per tiu alvoko volus ĝeni neniun k ni profitas la okazon por redanki ĉiujn k-dojn, kiuj fervore k sindoneme monhelpas nian bultenon, kio estas aparta afero k dankinda laboro, kiel ankaŭ tiu pri monkolektado por vestoj k nutraĵoj por la hispana popolo. Nian alvokon ni adresas al ĉiuj klaskonsciaj laboristoj en la mondo, per niaj esperantistaj kamaradoj, por ke ili agu konsekvence kun la kruda realo, postulanta plej decidan agadon k nepre materialan helpon. Ni deziras, ke oni rekonu ĉie, ke la venko de la hispana Popolfronto nur povas esti certigata per armiloj k municio, ĉar la faŝistaj ŝtatoj provizas niajn malamikojn malavare per ĉiuspecaj batalrimedoj k kontingentoj da «volontemaj» armeanoj.

## BONAJ VARTISTINOJ




# ATENTU!

Legi k disvastigi la enhavon de nia gazeto estas plenumo de duobla celo: Oni helpas la defendadon de la popolaj rajtoj k samtempe oni montras, per praktika uzado, la utilon de Esperanto. Por ni estas plene interesaj ambaŭ flankoj de nia afero. Tamen eble ne ĉiuj amikoj komprenis tion, ĉar kvankam aperis traduke, en multaj nacilingvaj ĵurnaloj, artikoloj niaj, nur malmultaj venis al la redakcio. Ni bezonas nepre ricevi, por kolekti, almenaŭ unu ekzempleron de ĉiu eldonaĵo aperiginta ion el nia bulteno. Tial do, vigle traduku, instigu publikigu k nepre ne forgesu sendi la koncernan ekzempleron por ke nia streĉa k elĉerpiga laboro ne restu anonima antaŭ granda parto de nia popolo.

## MARŜO DE L' ANTIFAŜISTOJ

dediĉata al la esperantista roto «ANTAŬEN».

Suno hispana, ĉiela lazuro,
Dolĉa kisado de venta kares'...
Sango, ruinoj, perforto, teruro,
Pafoj fusilaj, kanonaj, sen ĉes'.
Sonu signalo
al la batalo,
marŝu kun ard'
sub ruĝa standard'.

Bando faŝista de sangaj tiranoj
Volas forpreni la ĝojon de l'viv'
Premi la gorĝon al bravaj hispanoj,
Rabi, bruligi per mano de riff'.
Sonu signalo
al la batalo
sub ruĝa stel'
ke mortu ribel'.

Flugas en alto germanaj pilotoj,
Bombojn ĵetante al paca amas';
Marŝas diboĉe faŝistoj en rotoj,
Pafas virinojn, infanojn en ĉas'.
Do al batalo
sonu signalo
kontraŭ svastik'
pro la Respublik'.

Sed jam proletoj leviĝas defende,
Forte kuniĝas labora popol'
Fronten ekmarŝas heroe senplende
Bravaj taĉmentoj kun venka ekvol'.
Do al batalo
sonu signalo,
marŝ' kun rapid'
pro ruĝa Madrid'.

Tuta jam mondo kompreni komencas
Ĉie ekluktas ĝi kontraŭ faŝism'
Nigro kaj bruno egale esencas,
Mondo ja estas tutec-organism'.
Do al batalo
sonu signalo
kontraŭ svastik'
pro la Respublik'.

Venis ni ankaŭ ali-nacianoj
Kune batali sur lipoj kun kant',
Helpi defendon al fratoj-hispanoj,
Ĉiujn kunigas nin ja Esperant'.
Sonu signalo
al la batalo.
Marŝ', marŝ' sen lac'
pro monda la pac'.

Originale de E. MIĤALSKI

# SPIONADO EN HISPANIO

Ĵus aperis, germanlingve verkita, interesa libro sub titolo «Spionoj k konspirantoj en Hispanio» el kiu ni eltiras signifajn k sensaciajn konkludojn.

Germana faŝismo ne nur partoprene kulpas pri la monstra atako al hispana ordo; ĝi plenzorge preparis k poste gvidis la militistan ribelon. Kiam popola fronto, en kuraĝa entuziasmo k unueco, sukcesis venki en politika baloto, funkciis en nia lando pli ol kvindek ĉeloj por nacisocialista propagando, kiuj glate laboris per abunda provizo de mona lubriko.

Tuj de la komenco, ili klopodis korupti gazetojn k eldonejojn. Nur en la jaro 1934. aperis 164 artikoloj de faŝista propagando, ĉefe en influaj centraj ĵurnaloj de katolika tendenco.

Estas dika kontraŭeco inter tiu propagando en katolikaj organoj k la rigora persekutado al tiuj semreligianoj en Germanio mem. Nacisocialismo celas detrui ankaŭ la katolikismon kiam tiu estas demokrata k defendas la popolon. La germanaj katolikaj pastroj, kiuj pledas por la konscienca libero, estas severe persekutataj, per identaj metodoj, kiel la socialistoj, komunistoj aŭ pacifistoj...

Ĉiaj, plej variaj, propagandiloj estis sub la kontrolo k influo de la germana faŝismo kun fortika radikaro en nia lando: Specialaj agitistoj, taŭgaj filmoj, trafa literaturo, radiodissendado k. t. p. La faŝista teoriulo Rosemberg eĉ direktis al Hispanio siajn frenezaĵojn pri rasismo! Sendube, dank' al tiu stranga doktrino, okazis la kruela murdado al judoj, fare de l' ribelintoj en Zaragozo, dum la Rasa Festotago de lasta Oktobro.

Dum en Germanio vegetas proleta klaso k etburĝaro, k terure malsatas milionkvanta amaso pro ŝvelanta senlaboreco, tiulanda faŝismo sendas gaje la monon por subteno de ribelo k malpaco en nia lando. Nur dum jaro 1935. oni faris jenan distribuon laŭ nudaj ciferoj:

| | |
|---|---|
| Por organizado en eksterlando . . . . . | 132.000 ptoj |
| Por la germana fronto de laboro. . . . . | 180.000 » |
| Por fremdlanda servo . | 85.000 » |
| Por la Propaganda Fako | 360.000 » |
| Por speciala propagando el «Vintra Helpo». | 60.000 » |
| Por la oficejo «Fitche-Bund». . . . . . | 350.000 » |
| Por policaj agentoj k spionado. . . . . | 576.000 » |
| Por helpo al komercaj aferoj . . . . . . | 1.200.000 » |
| Entute. . . | 2.943.000 » |

La detaloj koncernantaj la unuan duonjaron de 1936. Ankoraŭ ne atingis nin, sed certe ili estas pli gravaj ĉar en tiuj monatoj la propaganda tasko certe estis kaŝe k intense akcelita pro tuja proksimeco de zorge preparita k bone nutrita ribelaĉo.

**MEMORU KONSTANTE, ke niaj amikoj el Germanio, Italio k Portugalio, soifas pri la vero de la hispana situacio. Al ili ni ne povas rekte liveri la bultenon, zorgu do vi mem iel ajn havigi ĝin al ili!**

# Demokrata Homo!

Objektive, sen aparta tendenco, nia bulteno POPOLA FRONTO, voko de libero tra la mondo, plenumas sian taskon kun obstino esperantista. La subteno k vivo de nia organo dependas nur de ĉiu amiko, kiu, komprenante la rolon de rekta informado, dediĉas kelkajn monerojn por ĉi tiu bultena entrepreno.

Tial, anstataŭ bonto, estas honoro por ni la insista peto: Kolektu monon en grupoj k rondoj, instigu ĉiujn pagi almenaŭ la koston de papero k afranko! Sendu tuj la monon al la internacia adreso k skribu poŝtkarton aŭ leteron al la redakcio.

INTERNACIA ADRESO
nur por mono
FARENC GUSTAVE
56, Rue du Parc
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

REDAKCIA ADRESO
por ĉio alia
POPOLA FRONTO
Mar, n.° 25
VALENCIA (Hispanio)

ranto, en sia kvindeka jaro, krias: Vivu la hispana Respubliko!

# MOZAIKO

● En Internacia Brigado kunbatalas arde k amike germana komandanto Hans k franca komandanto Dumont. Ili partoprenis samtempe la heroan batalon de Verdun, ĉiu en sia koncerna zono, k tuj post la milito ambaŭ forlasis la armeon k fariĝis civiluloj.

Ili memoras pri tagoj malproksimaj, pri tempo kiam ili batalis unu la alian, ne konante sin reciproke; nun ili luktas kune kontraŭ komuna malamiko, la faŝismo, k ne dubas pri certa k baldaŭa venko.

● Post aresto de faŝistoj en domo sub protekto de finnlanda flago, oni suspektis pri alia domo protektata de sama flago en strato Velazquez, 55.

Ĝi estis traserĉata de la polico k ankaŭ oni trovis interne 610 faŝistojn, bone provizatajn je armiloj, k estis tuj arestataj.

Vere tio montras interesan aspekton de la novebakita teorio pri «ne interveno», sensacia elpenso de diplomataro kiu konstante zorgas pri la paco.

● José Juarez kiu ĵus sukcesis eliri el faŝista infero, konfirmis ke en provinco Navarra estas fusilmortigitaj dudek kvar parencojn de katolika ministro Irujo.

Tiuj viktimoj nur kulpis pri tio ke ili estas familianoj de ministro de nia registaro.

Ankaŭ estas fusilmotigita filo de ministro Largo Caballero. La faŝistoj kaptis lin la unuajn tagojn kiam li, laŭleĝe, soldatservis. Li ne plenumis ian politikan postenon, sed... li estis filo de Largo Caballero!

Per tiaj agoj la faŝistoj intencas starigi novan ordon k civilizon, k defendi la moralajn principojn de katolika religio.

● La «glorinda» tasko, kiun faŝismo plenumas, ricevas gravan helpon de italaj k germanaj aviadiloj; ĵus ili atingis novajn sukcesojn.

La 8an. Decembro estis bombardata urbo Guadalajara. El fremdaj aeroplanoj falis kruele bomboj kiuj mortigis dudekon da virinoj k infanoj, k vundis alian dudekon.

Sekvantan tagon tiuj plenkuraĝaj birdoj atakis francan civilan aeroplanon kiu vojaĝis en la servo de franca ambasadoro; ĝi falis k kelkaj okupantoj estis vunditaj per «civilizaj» kugloj. Franca ĵurnalisto Louis Delapree, redaktoro de konservativa ĵurnalo «Paris-Soir» mortis en hospitalo.

● Kelkaj bomboj ĵetitaj el fremdaj aeroplanoj k multaj obusoj venintaj el faŝistaj kanonoj, ne eksplodis. Eĉ kelkaj el ili entenis skribaĵon kun flamaj vortoj de solidaro al hispana popolo.

Ni tutkore dankas la aŭtorojn de tiu sabotado kiu tiel efike montras verajn sentojn de ĉiulandaj laboristoj.

● Generalo Miaja, kiu gvidas defendon de Madrido, diris al gazetisto:

«Madrido estas nealirebla por la faŝismo. Pro tio, kiam normala vivo revenos en madridajn stratojn, ni starigos en Pordo de Alcalá monumenton al Nekonata Milicano, ĉar milicanoj estas kiuj savis Madridon.

Se tiuj grupoj de nepreparitaj k neorganizitaj viroj sukcesis deteni k repuŝi la faŝistojn, kiel dubi nun pri nia venko se ni jam havas veran armeon, kun plena milita efiko k provizita de la modernaj armiloj, kiujn postulas nia lukto?»

● Angla grafo Churchill tuj post sia reveno el ĵusa vojaĝo tra Hispanio, deklaris en Londono:

«Mi vidis en la batalfronto milicanojn de grizaj haroj; oficistoj, ministoj, advokatoj, ĵurnalistoj k scienculoj estas kune envicigitaj kun kamparanoj...

Kiam oni vidas tiajn ĉiuspecajn k diversprofesiajn soldatojn, oni tuj komprenas ke ili estas la plimulto de la lando; tuta popolo kiu luktas por defendi sian rajton al memrego.»

● En la okcidenta provinco Huelva, regata de l' faŝistoj, ankoraŭ restas fortaj k bravegaj grupoj da laboristoj kiuj bone batalas en la montoj. Estas la ministoj de Riotinto k Valverde, tie ili lerte sin defendos ĝis la alveno de niaj trupoj. La tiea faŝista provincestro De Haro malgraŭvole konfirmis tion al ĵurnalistoj.

● La 12an. Decembro, posttagmeze, je dek mejloj de Malaga, nia submarŝipo C-3 estis torpedata de fremda submarŝipo. 39 maristoj pereis. Hispanaj faŝistoj ne havis tiam eĉ unu ŝipon submaran.

Dume, la farso de «ne interveno» daŭras k demokratiaj landoj restas surdaj k blindaj. Ankoraŭ sukcesas faŝista taktiko, ĵeti ŝtonon k kaŝi la brakon.

● Laŭ fidindaj sciigoj, la faŝistoj jam komencis ordigi la vivon en la ariergardo. En Seviljo, burĝuloj, militistoj k diversklasaj faŝistoj, ĉiutage diboĉas pogrande. Generalo Kejpo kune kun fripono bone konata, ekspluatas kabaredon «Los Rosales» k ludĉambron similan al tiuj de Montecarlo. Ili sin preparas serioze al nova faŝista sociordo.

● Nia blendita vagonaro «K» intense laboras en Madrida fronto. Ĝi estas nomata «la teruro de l' faŝistoj», ĝi estas ekipita per kanono k mitraliloj. Apud Parla, per tiu kanono ĝi difektis tri tankojn k rekaptis alian blenditan vagonaron, la «H», kiu antaŭ kelkaj tagoj estis devigata resti en malamika zono. En Pinto la vagonaro «K» liberigis la fervojistajn kamaradojn, kiuj rezistis en stacidomo, k frakasis du faŝistajn kanonojn. En Getafe ĝi detenis faŝistan kolonon konsistantan el dekunu tankoj, infanterio k maŭra kavalerio; per ĝia kanono restis detruitaj kvar tankoj, la aliaj estis devigataj malantaŭeniri k per la mitraliloj la bravegaj okupantoj de la vagonaro mortigis pli ol kvin cent maŭrojn.

● Angla gazetaro ironie raportas pri fakto ĵus okazinta en Gibraltaro, kien alvenis kelkaj hispanaj faŝistaj oficiroj por dungi interpretistojn, ĝisfunde konantajn germanan k italan lingvojn. Malgraŭ ke ili promesis monatan salajron de 600 pesetojn krom allogan uniformon, ili nur povis konvinki du anglojn.

En Gibraltaro oni mokas senkaŝe pri la intelekta kapablo de l' hispanaj faŝistoj kiuj sin kredas «superuloj».

● Germana k portugala registaroj anoncis al Komitato por la «ne interveno» ke ili ne akceptas la sendon de neŭtralaj observantoj al siaj aerodromoj por neebligi la liveradon de aeroplanoj al hispanaj faŝistoj. Konsekvence, la projekto pri kontrolo estas resendita el teknikistoj por ke ili ellaboru novan planon, kiu povos plaĉi al ĉiuj registaroj.

Ni ne bone komprenas la komplikaĵojn de tiu tasko, ĉar la solvo estas tre simpla. Oni povas proponi al tiuj registaroj ke ili mem sendu la necesajn observantojn; tiamaniere la tasko de la observantoj estos facile plenumata.

● En Bataliono de Konstruado estas akceptita kiel milicano la pastro de vilaĝo Valdemorillo, Rafael Cabaleas. Kiam li sin prezentis al komandanto, diris:

«Mi estas kristano, k pro tio mi ĉiam staris apud la libero k la malriĉuloj. Vi pravas, k mi promesas helpi vian lukton se oni ne devigas min rezigni mian religian kredon. Mi ne aprobas politikan sintenon de Eklezio, kiu ĉiam agas la malon ol ĝi estas devigata fari laŭ puraj religiaj principoj. Mi k ĉiuj junaj pastroj de nia lando opinias tutsame.»

Li prenis fusilon k kuraĝe albatalas faŝismon kun siaj kamaradoj, la laboristoj.

**AŬSKULTU RADIODISSENDOJN DE VALENCIO PRI HISPANA SITUACIO EN ESPERANTO!**

Stacio de Komunista Partio—ondlongo 41,87 metroj—marde k vendrede je la 17ª horo (hispana tempo)

Stacio de C. N. T.-F. A. I.—ondlongo 42,40 metroj—lunde k vendrede je la 19ª horo (hispana tempo)

La socialista Stacio provizore ne funkcias

